

Ĝemeliĝo de urboj kaj vilaĝoj, 2-a parto
Claude Gacond, 76-a radioprelego, 1964.05.13 & 16

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Vi aŭdas Claude Gacond raportanta pri la ĝemeliĝo de urboj kaj vilaĝoj.

Lastjare, de la 19-a ĝis la 22-a de septembro, okazis en Aosto, la itala urbo, kiu ĵus estas ligita per aŭtomobila tunelo al la nordo de Eŭropo trans la ĝis nun alpa muro, en Aosto mi diris, okazis la **Unua Eŭropa Konferenco pri Monda Kooperado Interkomunuma**, tio sub la egido de la **Monda Federacio de la Ĝemeligitaj Civitoj**. Dum tiu manifestacio plian fojon esprimiĝis la volo vidi konstruiĝi pli homeca mondo. Kiel kutime tiu renkonto konkludiĝis per manifesto, kiu esprimas tiun volon. Jen kion ĝi diras :

*Unuigitaj kiel la fingroj de mano, la ĝemeligitaj civitoj alportas ĉien pacon kaj prosperon.
Ili observas kvin regulojn tiel logikajn kiel simplajn :
Konsideri la ĝemeligon de civitoj kiel kulturigan instrumenton sen iu ajn partia maltrankviligo ;
Ne miksiĝi en la internajn aferojn de la ceteraj civitoj ;
Malkcepti neniun civiton, kaj en ĉiu civito neniun bonan volon ;
Kontribui al la elspezoj de la organizaĵoj ;
Se eble instrui, apud la nacia lingvo, lingvon de internacia komunikiĝo, kiel la francan aŭ la anglan.*

Kaj tiu Manifesto finiĝas kun tiu konkludo :

Tiel unuigitaj, sinceraj, kunlaboremaj, civitoj el ĉiuj kontinentoj sin interhelpas, progresas dank'al diskonigo de siaj eksperimentoj kaj donas al sia junularo internacian civitan formadon.

Kun pravo ili ankoraŭ aldonas:

Tiu plibonigo de la materiaj, intelektaj kaj moralaj vivkondiĉoj de la loĝantaroj de la ĝemeligitaj urboj fariĝas faktoro pli kaj pli decidiga de la homara kaj kultura evoluo.

Kiam mi legas similan dokumenton, mi ŝatas pensi, ke hodiaŭ jam 41 milionoj da loĝantoj vivas en komunumoj, kies estroj obeas al la principaro de la ĝemeligitaj civitoj. Ni nun ekzameni tiun kvinpaktan principaron:

La unua punkto rilatas al **senpolitikismo**. Ĝi diras:

La kultura ĝemeliĝo estas ligo, kiu unuigas en spirito de egaleco kaj reciprokeco la tutajn loĝantarojn de du aŭ pluraj urboj de malsimilaj landoj, en la celo favori personajn kontaktojn kaj interŝanĝojn de ideoj, teknikoj kaj varoj. Konceptita kiel instrumento de popola kulturo kaj internacia civitana formado, ĝi havas elstare socian kaj edukan karakteron kaj ĝi ne rajtas esti devojigita el sia celo pro personaj, partiaj aŭ politikaj kaŭzoj.

Estas dank'al tiu punkto, kiu garantias absolutan neŭtralecon en la rilatoj inter la ĝemeligitaj urboj, ke la helpo al malpli privilegiitaj komunumoj fariĝis tiel konstrua, dum la helpo pere de ŝtataj instancoj ofte odoras novkoloniisme.

La dua punkto, kiun ni povas titoli **neenmiksiĝo**, ĉiam temas pri tiu grava problemo kapabli helpi sen trudi proprajn dezirojn. Ĝi diras:

Starigita sur la egido de municipoj kun la konsento de la loĝantaroj, la kultura ĝemeliĝo devas esti prezervata de ĉiu ajn enmiksiĝo kontraŭa al la komunumaj liberecoj. Same ĝi ne povas esti uzata kiel preteksto pro intervenoj en la proprajn aferojn de la asociitaj civitoj.

La tria punkto ankoraŭfoje rilatas al tiu malfacila interhoma kunlaboro. Dum la antaŭa malpermesis enmiksiĝon en la aferojn de alia urbo, tiu ĉi malpermesas malpermesi ion al alia urbo. Ĝi diras:

Ĝemeliĝo de urboj kaj vilaĝoj, 2-a parto
Claude Gacond, 76-a radioprelego, 1964.05.13 & 16

Tiel difinita, la kultura ĝemeliĝo povas esti akompanata de nenia ekskluzivo, nek ekster, nek en la civito.

- a) *En la inter-civitaj rilatoj ĝi devas faciligi la interpopolan komprenon, sendepende de la institucioj, kiuj ĝin regas. La geografia distanco, la tradiciaj kaj ideologiaj diversecoj, ne estas obstakloj, sed nur igas la ĝemeliĝon pli bonvenan.*
- b) *En la civito, la ĝemeliĝo devas esti rimedo por kunigi bonvolojn el plej diversaj tendencoj, originoj kaj formadoj; ĝi devas tuŝi ĉiun agadon: vivon familian, profesian, ekonomian, turistan, artan, sportan kaj intelektan.*

La punkto, kiu plej interesas la esperantistaron, rilatas al la dulingvismo. Ĝi diras:

Pro la grava malhelpo kaŭzata de la diverseco de la lingvoj por starigo de personaj kontaktoj je la plej modesta ŝtupo, unu el la ĉefaj taskoj de la kultura ĝemeliĝo estas akceli en ĉiuj medioj la konstruadon de dulingva mondo fondita sur tiu ĉi principo: la rajto por ĉiu homo al sia hejma lingvo estas ligita al la devo por ĉiu homo estri vivantan lingvon de monda komunikigo.

En la komenco de sia agado la Monda Federacio de la Ĝemeligitaj Civitoj menciis la lingvojn anglan kaj francan. Dek jaroj da ĝemelado bedaŭrinde montris, ke tiuj lingvoj malfacile permesas al simpluloj verajn kontaktojn personajn je la plej modesta ŝtupo. Por povi vere paroli tiujn malfacilajn lingvojn naciajn, necesas ilin studi dum longaj jaroj, ĉu almenaŭ en altaj lernejoj, ĉu preferinde en lando, kie ili estas parolataj. Montriĝis ankaŭ, ke inter tiuj, kiuj sin diras kapablaj paroli ilin, la plej multo ilin tamen ne sufiĉe estras por respondeci kiel interpretistoj dum kunveno. La momento proponi la servon de esperanto certe alvenis. La kunlaboro de la esperantistaj grupoj dum la ĝemeliĝaj manifestacioj kaj poste por la interloĝantaraj kontaktoj estus akceptata kun dankemo. Tio ne signifas, ke ni devas kritiki la dulingvismon bazitan sur la lingvoj franca kaj angla. Nia lingvo eĉ povus kontraŭe, se ĝi estus uzata kiel baz-lingvo, helpi al la pli racia kaj rapida instruo de tiuj grand-kulturaj lingvoj. Ni modeste plenumu nian taskon, kaj de si mem esperanto iom post iom trudiĝos, kiel ebla aŭ vera solvo al la dulingvismo.

La sesa kaj lasta punkto rilatas al la solidareco inter la ĝemeligitaj civitoj. Ni vidas en ĝi la ĝermon al speco de Parlamento de la Komunumoj.

Mi atentigas vin, ke se vi skribas al Radio-Svislando en Berno, vi ricevos broŝuron pri la ĝemeliĝoj. En la franca lingvo ĝi titoliĝas *Le jumelage des villes*, en la angla *Town twinning* kaj en la germana *Städte Partnerschaften*.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la ĝemeliĝo de urboj kaj vilaĝoj.

Ĝis reaŭdo!

-oOo-